

Manifesto

Hodiaŭ, la 10an de novembro 2018 je la 16a, 100 jarojn post la la fino de la Unua Mondmilito, kiu detruis la Eŭropan ĉivilizacion por jardekoj, ni ne nur memoras la historion, sed ankaŭ prenas nian estonton en niajn proprajn manojn.

Estas la tempo por realigi la internan Eŭropan promeson kaj por rememorigi al ni la fundamentajn ideojn starantajn malantaŭ la projekto de Eŭropa integriĝo.

Ni deklaras ĉiujn ĉi-momente estantajn en Eŭropo civitanoj de la Eŭropa Respubliko.

Ni agnoskas kaj akceptas nian respondecon pri la komuna heredo de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj kaj promesas realigi ilin finfine.

Ni konscias, ke la riĉeco de Eŭropo fontas el la ekspluatado de aliaj kontinentoj kaj el la subpremo de aliaj kulturoj dum jarcentoj. Tial ni volonte dividas nian teritorion kun tiuj, kiujn ni forpelis de ilia.

Ĉiu, kiu deziras tion, povas esti Eŭropano. La Eŭropa Respubliko estas la unua paŝo sur la vojo al tutmonda demokratio.

La Eŭropo de nacioj malsukcesis. La ideo de la Eŭropa unuiĝo estas perfidita.

Sen politika tegmento la Interna Merkato kaj la eŭro iĝs facila predo de novliberala agendo, kiu kontraŭas la principon de sociala justeco.

Tial la potenco en la Eŭropaj institucioj devas esti reakirita, por krei komunan merkaton kaj komunan valuton kadre de komuna Eŭropa demokratio.

Ĉar Eŭropo signifas kunigi homojn, ne integri ŝtatojn.

La suverenecon de ŝtatoj anstataŭas ekde nun la suvereneco de la civitanoj. La Eŭropa Respubliko estas fondita sur la principo de universala politika egaleco, sendepende de nacieco kaj socia aŭ etna deveno.

La konsistaj elementoj de la Eŭropa Respubliko estas la urboj kaj la regionoj. Estas nun la tempo, la kultura diverseco de Eŭropo esprimas sin en la kadro de politika unueco.

Jen la Eŭropa Konsilantaro estas demisiita. La Eŭropa Parlamento havas nun leĝodonan potencon. Ĝi elektos registaron devontigatan al la bonfarto de ĉiuj Eŭropaj civitanoj.

Vivu la Eŭropa Respubliko!

Ulrike Guérot kaj **Robert Menasse**

Kun subteno de **Milo Rau**

Tradukita de **Konrad Gramelspacher**, **Pierre Dieumegard** kaj **Rudolf Josef Fischer**

THE EUROPEAN BALCONY PROJECT